

La Informilo de Nagoja Esperanto- Centro

センター通信 277 Majo 2015

発行：名古屋エスペラントセンター Nagoja Esperanto-Centro
461-0004名古屋市東区葵一丁目26-10ユニブル新栄301号
<http://homepage2.nifty.com/nagoja-esperanto/> <https://www.facebook.com/nagoja.esperanto>



ペルージャ外国人大学（イタリア）のクラスメートとパーティーを楽しむ伊藤俊彦・順子夫妻

自己紹介.....	2
総会の報告.....	3, 12, 13, 15, 16
猪飼吉計新委員長のあいさつ.....	3
Pri la islamaj teroristoj.....	maeda 4
Mia studenta vivo en Peruĝio	Ito Toŝihiko 5
Revivigo de Budhismo en Barato.....	Yamaguti Sin'iti 8
Pilgrimado al Caravaggio kaj aliaj	Ito Toŝihiko 11
イーブルなごや・フェスティバル2015.....	17
第64回東海エスペラント大会の案内	18
編集者から.....	18



ミニ講演会の報告

2015年4月4日のセンター維持員総会の後、午後4時半から5時半まで、ミニ講演会を行いました。

講演者は清水美穂さん「ボスニアの修道院を訪ねて」。清水さんは在野のボスニア研究者。修道院での古文書発見をとおしてわかったことを語っていただきました。

もう一つは、センター委員の山口眞一さんによる“Pri renovigo de budhismo en Bharato”。プロジェクトを使用して、インド仏教の現状を紹介しました。

出席者は11名。

この後、ルーマニア料理店「サルマーレ」に席を移して、ワインと食事を楽しみながら歓談した。

こちらは出席者8名。



猪飼吉計新委員長のあいさつ...

期のちょうど中間あたりで、わたしが企画の委員を降り、山口眞一さんが企画を引き受けてくれました。なお、これにともない、委員長の席が、山口さんからわたしに移行しましたことを、ここに報告致します。

Pri la islamaj teroristoj, mia opinio estas sube sed ĝi estas konfuza.

maeda

Mi estas Charlie aŭ Mi ne estas Charlie.

Atako kontraŭ la redakto de Charlie Hebdo okazis la 7-an de januaro 2015 en Parizo, kiam du maskitaj homoj eniris en la redaktojn de tiu franca gazeto. Ataka grupo estis farita de fratoj, kiuj celis mortigi ĵurnalistojn kaj redaktorojn de Charlie Hebdo.

Tiu ĉi islama terorista atako donis grandan ŝokon ankaŭ al mi kaj multaj tutmondaj popoloj. La influo de la atako al la franca socio estas granda kaj la vojo al la solvo de tiu ĉi problemo estas serioze peza kaj profunda.

En Francio pli ol 3 milionoj da civitanoj manifestacis protestante kontraŭ la terorisma atako. Povas esti, ke la ago nomata terorismo, kiu rabas en momento niajn feliĉajn pacajn tagojn kaj vivojn, tute ne permesebla. Jes certe malpermesebla afero, sed okaze de la manifestacio inter estroj de eŭropaj politikaj estroj, franca prezidento François Hollande, germana ĉefministro Angela Merkel kaj aliaj esprimis volon de kontraŭ terorismo--- mi trovis inter ili kune esti Benjamin Netanyahu kaj Mahmoud Abbas. Mi havas strangan senton pri tiu ĉi sceno.

Kio esta tia sceno? Teroristo Benjamin Netanyahu, kiu mortigis multajn palestinajn homojn, ankaŭ kontraŭas terorismon. Ĉu tiu ĉi sceno estas komedio? per intuicio mi pensas. Sub la nomo de kontraŭterorismo, teroristo mem partoprenis en la manifestacio. Ankaŭ eble la teroristoj mem kredas ke ilia morto estas sankta batalo kontraŭ malamiko de islama mondo.

Japanaj amaskomunikiloj raportis ke en Islama ŝtato teroristoj mortigis 2 japanajn ostaĝojn senkapige. Ĉu ĝi estas vere aŭ ne, nuntempe ne certas. Mankas al ni evidenta informo pri la afero.

Nia registaro pensis ke la videoj evidentas, kaj ne necesas bezonata pruvo. Verŝajne vera ĝi estas, sed strange nia registaro postulis nenion pli. Kio necesigis la registaron ne postuli eĉ ostojn de 2 japanoj? Mi ne povas kompreni.

Tiam Japana ĉefministro Abe vizitis Israelon kiam li tute ne konsideris 2 japanajn ostaĝojn. S-ro Abe ofte uzas la vorton "pozitiva pacismo". Laŭ "pozitiva pacismo", Japanio rajtas militi por kolektiva memdefenda rajto.

Miaopinie li kondutas kiel reĝo. Li estas nur nuntempa ĉefministro. Sub la nomo de milito kontraŭ teroristoj kaj teroristaj landoj, Usono invadis islamajn landojn.

Same kiel Usono, S-ro Abe volas konduti en sama maniero de invadanto. Post Vjetnama milito pli kaj pli libereco de esprimo apartenas al la registaro.

Jes bone la registaro ellernas teknikon por manipuli amaskomunikilon kaj popolon. Iom ni devas preni unu paŝon malantaŭen, kaj pripensi la aferojn. Kiam venos la tempo, en kiu homoj vivas en paco? La sama suno lumigas la tutan mondon. *

Mia studenta vivo en Peruĝio

Ito Toŝihiko

Mi kaj mia edzino ekloĝis en Italio oktobre 2012 kaj mi forlasis ĝin februaro 2014, do mi loĝadis tie entute unu kaj duon jarojn. Dum tiu tempo mi revenis hejmen kelkfoje. Ni loĝis en la urbo Peruĝio, kiu situas en la centra parto de Italio kaj estas tre malnova kaj bela urbo, kvankam la plimulto de japanoj scias, nur ke la japana futbalisto Nakata unue apartenis al la klubo de Peruĝio en 1998.

Ni kune studis la italan lingvon en la Universitato por fremduloj de Peruĝio kaj mia edzino ankoraŭ studas ĝin sola post mia reveno al Japanio. De nun mi raportos pri nia vivo en Peruĝio, precipe pri la instruado de la itala lingvo en tiu universitato.

- La edukprogramo

La edukprogramo de la universitato konsistas el 6 gradoj, nome, A1, A2, B1, B2, C1 kaj C2. A estas la elementa grado, B estas la meza grado kaj C estas la supera grado. Tiu sistemo respondas al la komuna eŭropa framo de referenco por lingvoj, t.e. en la angla lingvo : Common European Framework of Reference for Languages (CEFR) kaj en la japana lingvo : ヨーロッパ言語共通参照枠.

Mi sukcesis en ekzameno kaj ricevis la diplomon de B2. La plena noto de la ekzameno estas 30 kaj mi akiris 25 poentojn. Poste mi ĉeestis la klason de C1 du monatojn, sed antaŭ la ekzameno mi revenis hejmen, tial mi ne ekzameniĝis, nek ricevis la diplomon de C1. Por ricevi la diplomon de C1, necesas manipuli la lingvon same kiel la patrinan lingvon.

Studentoj devas preni almenaŭ 20 horojn da leciono ĉiusemajne. Tial mi estis tre okupita ĉiutage por prepari kaj relerni lecionojn, fari hejmtaskojn kaj prepari por ekzameno en la hejmo.

- Studentoj

Studentoj devenas el diversaj landoj kaj la itala lingvo ne estas ilia patrina lingvo. Kaj la granda parto de instruistoj estas italoj. Unu klaso konsistas el ĉirkaŭ 20 aŭ 30 klasanoj, sed unu grupo por ekzerco konsistas el pli malmultaj.

Mi konatiĝis kun multaj studentoj. Ekzemple unu el miaj samklasaninoj estas slovaka studentino, kies patro estas ĉasisto. Ŝi volas fariĝi instruistino de la itala lingvo en Slovakio, sed ne estis tre diligenta kaj ŝi ofte petis min vidigi al si miajn hejmtaskojn. Ne nur gejunuloj, sed ankaŭ gemaljunuloj studis tie, ekzemple mi konatiĝis kun unu ĉiliano, kiu estis jam pli ol sepdek-jara, sed studis multe pli diligente ol aliaj gejunuloj kaj ofte legis italajn romanojn.

Estis ankaŭ multaj geĉinoj. Multaj el ili estis jam gestudentoj en Ĉinio kaj vizitis la universitaton por studi la italan lingvon laŭ la projekto Marko Polo, t.e. la sistemo de akcepto de ĉinaj studentoj en Italion. Sed estis alispecaj geĉinoj venigitaj de siaj

gepatroj, kiuj laboris jam de antaŭe en Italio. Tiuspeciaj geĉinoj estis ĝenerale pli junaj ol gestudentoj. La plej juna ĉino, kiun mi vidis, estis 15 aĝa. Mi povis komunikiĝi kun ĉinoj ne nur en la itala lingvo sed ankaŭ per skribo de ĉinaj literoj, kiel ekzemple, 国破山河在 城春草木深 ktp. .

Estis multaj koreaj studentoj. Mi konatiĝis ankaŭ kun kelkaj koreaj pastroj, kiujn la eklezio ordonis, ke ili studu teologion en universitatoj en Romo kaj anticipe studu la italan lingvon en Peruĝio.

Ankaŭ multaj japanaj gestudentoj venis, sed bedaŭrinde la plimulto de ili ne estis diligentaj, nek ambiciaj. Ili ĝenerale ne havis intereson pri la arto, muziko, literaturo, entute, la kulturo kaj la socio de Italio, nek studis serioze la italan lingvon, kvankam ili apartenis al la fako de la itala lingvo en japanaj privataj universitatoj ĉefe en Kansajo. Kaj al mi ŝajnis, ke ili venas al Italio, nur pro tio, ke ili povas akiri unuojn.

- Epizodoj de lecionoj

Estas tre grave, ke studentoj esprimas siajn opiniojn pri unu fiksita temo. Ekzemple, en iu leciono, la instruistino demandis nin, ĉu estas la libro, kiu donis grandan influon al ni kaj ŝanĝis nian vivon, kaj ni studentoj devis respondi ĝin senprokraste.

Mi respondis jene : La libro, kiu ŝanĝis mian vivon, estas “Mallongeco de la vivo”, verkita de Seneko, la fama filozofo kaj politikisto en la antikva Romo. Mi legis ĝin kaj multe emociiĝis kaj tuj decidis retiriĝi el la laboro kaj translokiĝi al Italio por lerni la italan lingvon ktp. Tiel mi parolis.

Kompreneble tiu ĉi respondo ne estas mensogo, sed iomete troigita, sed ju pli draste ni parolis, des pli alte taksis nin niaj instruistoj.

Mi sciis, ke estas tre grave por studentoj esprimi siajn opiniojn, sed tio estas tre malfacila. Laŭ mia impresoj, la plejmulto de la fremdlandaj studentoj parolas elokvente kaj longedaŭre, sed la plimulto de japanoj, inkluzive de mi, ne povas agi tiel. Kial? Mi pensas, ke tio probable estas la sekvo de la edukado ne nur de la angla lingvo, sed ankaŭ de aliaj lernoobjektoj en Japanio.

- Libera tempo

Ni regule vizitadis la universitaton ĉiutage kaj studis ankaŭ en la hejmo. Sed preskaŭ ĉiun semajnfino mi vizitis multajn malgrandajn urbojn proksime al Peruĝio per trajno aŭ buso kaj vidis multajn pentraĵojn en tieaj muzeoj, kirkoj, ktp. kaj gustumis lokajn kuiritaĵojn kaj vinojn. Tio estas neforgesebla sperto por mi.

Niaj instruistoj kaj aliaj italoj ofte invitis nin al siaj hejmoj kaj kune vespermanĝis kaj ankaŭ ni rekompence invitis ilin kaj ankaŭ fremdlandajn studentojn al nia malgranda kaj malnova apartamento, konstruita antaŭ pli ol 800 jaroj, kaj regalas ilin per japana kuiritaĵo.

Mia edzino estas kaligrafino kaj kune kun unu japana pentristino, kiu loĝadas en Peruĝio jam pli ol dudek jarojn kun siaj itala edzo kaj filo, faris tri ekspoziciojn kaj kelkajn lecionojn de kaligrafio por italianoj kaj fremduloj.

- La nuna situacio de Italio

Multaj japanoj havas tre belan imagon pri Italio. Ĝi ja havas multajn famekonatajn historiajn monumentojn, kirkojn, muzeojn, placojn, teatrojn kaj belajn naturajn pejzaĝojn kaj oni povas gustumi paston, picon, fromaĝon, vinon ktp. Tio estas fakto. Sed aliflanke Italio nun suferas la longedaŭran krizan situacion.

Ekzemple la proporcio de senlaboreco estas ĉirkaŭ 13 procentoj kaj tiu de gejunuloj superas 40 procentojn.

Kaj loĝas tre multaj fremduloj, kiuj alvenis al Italio laŭleĝe aŭ kontraŭleĝe por trovi laboron el Libio, Albanio, Rumanio kaj aliaj afrikaj aŭ ekssocialismaj landoj. Multaj italoj pensas, ke la plimulto de ŝtelistoj, drogistoj kaj prostituitinoj estas fremduloj. Mi ne scias, ĉu tio estas realo aŭ ne. Sed iun tagon mi hazarde trovis uzitan injektilon sur la strato proksime al lernejoj. Kaj alian tagon mi vidis, ke kelkaj junulinoj, kiuj estis dense ŝminkitaj kaj portis tre mallongajn kaj provokajn jupojn, staris apud la vojo. Ili verŝajne atendis klientojn.

Sed malgraŭ multaj negativaj faktoj, mi esperas, ke ne nur gejunuloj sed ankaŭ plenaĝuloj kiel mi studos en aliaj landoj, ĉar la studado en Peruĝio donis al mi grandan ĝojon kaj multajn eltrovojn.



En la klasĉambro kun samklasanoj el Hindio, Kazaĥio, Hungario, Francio, Koreio, Kartvelio ka.

REVIVIGO DE BUDHISMO EN BARATO

DE YAMAGUTI SIN'ITI

Revivigo de Budhismo en Barato
- resumo de la prelego -

Religioj en Barato

Budhismo naskiĝis en Barato antaŭ ĉ. 2500 jaroj. Sed ĝi preskaŭ pereis aŭ detruigis pro kelkaj kialoj; atako de islamanoj, miksiĝo kun indiĝena religio (t.e. Brahmanismo), k.t.p. Nun la plej dominanta religio en Barato estas Hinduismo, t.e. reformita Brahmanismo, kaj ĝin sekvas Islamo. (fig.→) (fig.↓)

RELIGIO EN BARATO

■ Hinduo	80.5 %
■ Islamo	13.4 %
■ Kristano	2.3 %
■ Ŝiĥoj	1.9 %
■ Budhanoj	0.8 %
■ Ĝainistoj	0.4 %

Budhismo en Barato, nuntempe

Budhanoj en Barato estas minoritatoj. Tie Budhismo formas ĉefe tri fluojn.

- 1) Bengala Budhismo, postvivinto de antikva Budhismo ĉefe en Bengala regiono.
- 2) Tibeta Budhismo. Ĉar Dalai-lamao kaj liaj subuloj rifuĝis el Ĉinio kaj starigis emigracian registaron, ĉirkaŭ li kolektiĝis multaj tibetanoj.
- 3) "Nova" Budhismo, subtenata de dalitoj, t.e. diskriminacioj de la kasta sistemo. (fig.↓↓)

BUDHISMO EN BARATO 1

- ☉ 5-12 jc: iĝis pli kaj pli esoterisma (hinduismo)
- ☉ 13 jc: Islamaj fortoj invadis kaj detruis monaĥejojn, mortigis budhanojn
- ☉ NUN: Tri fluoj
 - Bengala Budhismo (tradicia / esotera)
 - Tibeta Budhismo (pro rifuĝo el Ĉinio)
 - “Nova” Budhismo (subtenata de dalitoj)

komenciĝis fare de Dharmapala el Srilankao. Sed la plej grava mejloŝtonon metis Ambedkar, la unua ministro de justicaj aferoj en Barato, la patro de la konstitucio de Barato, kaj denaske dalito. En 1956 li konvertiĝis al Budhismo kun ĉ. 500,000 dalitoj.

Bedaŭrinde Ambedkar mortis tuj post la kolektiva konvertiĝo, nove naskitaj budhanoj perdis sian gvidanton. En 1967 subite aperis antaŭ ilin japana bikŝuo, Sasai Syûrei, kiu heredis la laboron de gvidado de dalitaj budhanoj. (fig.↑)

Kial dalitoj subtenas Budhismon? Hinduismo enhavas kastan sistemon. Se dalitoj volas liberigi sin de kasta diskriminacio, ili devas forĵeti Hinduismon. Budhimo montras, ke denaska klaso ne decidas noblecon de homoj.

Budhismo en Barato, historie

La unua provo revivigi Budhismon en Barato

BUDHISMO EN BARATO 2

- ☉ 1891 Dharmapala fondis “Societon de Mahabodio”
- ☉ 1956 Ambedkar konvertiĝis al Budhismo kun 500,000 da dalitoj en Nagpur.
- ☉ 1959 Dalai-Lamao 14-a rifuĝis en Baraton
- ☉ 1967 Sasai Syûrei komencis sian agadon
- ☉ 1992 La unua batalo por repreni la Grandan Templon de Mahabodio en Buddagaya (ĝis la 10-a batalo en 1998)

KIU ESTAS AMBEDKAR?

- ❖ 1891-1956
- ❖ politikisto devena de dalito
- ❖ patro de Bharata Konstitucio
- ❖ La unua ministro pri justicaj aferoj
- ❖ Li pensis: Budhismo estas la sola rimedo por liberigi homojn el kasta sistemo.
- ❖ Lia verko “Budho kaj lia Dharmo”



Kiu estas Ambedkhar?

En la batalo por sendependigi Baraton Gandhi estas fame konata, kaj respektata de multaj. Sed li ne intencis nei kastan sistemon, opiniante ke ĝi estas gardinda kulturo. Tiurilate Ambedkar kaj Gandhi akre kontraŭstaris inter si. Gandhi nomis dalitojn “idoj de dio”, kaj Ambedkar

sarkasmis: "Se dalito estas ido de dio, tiam brahmo kaj aliaj klasanoj ne estas ido de dio." (fig.↑↑)

Kiu estas Sasai?

Sasai speritis multajn malfacilaĵojn en Japanio antaŭ kaj post sia bikŝuiĝo. Li transloĝis en Barato, ne pro klala motivo, kaj eksciis la ekziston de Ambedkar kaj samtempe la situacion de tiea Budhismo. Dum pli ol 40 jaroj li neniam revenis al Japanio kaj strebadis por kuraĝigi budhanojn. Inter diversaj laboroj menciindas, ekzemple, batalo por repreni Mahabodhi-templo en Buddhagaya al la manoj de budhanoj. (Kvankam ĝi estas la loko, kie Ŝakja-munio vervekiĝis, do la unua sankta loko por budhanoj, administra rajto estis ĉe hindua familio.) (fig.↑)

KIU ESTAS SASAI?

- ❖ **Japandevena monaĥo** Bhadant-G Arya Nagarjuna Shurei Sasai
- ❖ **1966 Venis al Barato (Kolkata kaj Rajgir por helpi Nihonzan-Myōhō-zi)**
- ❖ **1967 Ekloĝis en Nagpur, kaj lernis pri Ambedkar**
- ❖ **2003-05 Reprezentanto de budhanoj en minoritata komisiono de la registaro**
- ❖ **Ĝis hodiaŭ, konstruo de temploj, batalo kontraŭ hindua potencularo, elfosado de antikvaj ruinoj, gvido de barataj budhanoj.**

Mia vojaĝo en Nagpur

En oktobro de 2014, mi vojaĝis al Nagpur, kie okazis la kolektiva konvertiĝo fare de Ambedkar kaj poste ĉiujare okazas sub la gvido de Sasai. Mi deziris mem vidi la etoson de la budhisma movado en Barato. Pri detaloj de mia sperto mi skribis japane:

http://www.nagoya30.net/temple/kyosin/sin-iti/eseo/eseo_26.html

Kiom da budhanoj troviĝas en Barato?

Sasai diras, ke nun troviĝas 150 milionoj de budhanoj. Sed laŭ ŝtata statistiko en 2001, budhanoj oficiale registritaj nombras nur 8 milionoj. Eble Sasai troigas, sed aliflanke notindas, ke dalitoj ne nepre deziras agnoskitaj kiel "budhanoj" pro timo perdi laboron. Do laŭ mia supozo la efektiva nombro troviĝas inter du ekstremoj, nome kelkdek milionoj. (fig.→)

KIOM DA BUDHANOJ ESTAS EN BARATO?

- ❖ **maksimume: 150,000,000 (laŭ Sasai) -- iom troigo?**
- ❖ **oficiale: 8,000,000 (statistiko en 2001)**
- ❖ **registara statistiko ne konfidinda**
- ❖ **dalitoj ne volas esti registritaj kiel "budhano"**
- ❖ **verŝajne: kelkdek milionoj**

Pilgrimado al Caravaggio kaj aliaj

Ito Toŝihiko

Mi ŝatas vidi pentraĵojn, tial mi ofte vizitas la ekspoziciojn de pentraĵoj. Kiam mi vojaĝas en iu urbo, mi ofte vizitas tiean muzeon. Tial mi vizitis kelkajn famekonatajn kaj grandajn muzeojn en Italio, kiel ekzemple, Uffizi en Florenco, Brera en Milano, Vatikano, Capitolino kaj Borghese en Romo, Accademia en Venecio, Capodimonte en Napolo. Kaj ankaŭ en Japanio mi ŝatas viziti muzeojn.

Kaj mi ofte vizitas kristanajn kirkojn aŭ preĝejojn por vidi la pentraĵojn sur la muroj, faritajn ĉefe per la metodo de fresko. Oni ne povas movi ilin, kaj tial, por vidi tiajn pentraĵojn ni mem devas iri tien. De nun mi prezentos al vi kelkajn mondfamajn murpentraĵojn, kiujn mi vidis en Italio.

Unue mi vidis la murpentraĵojn de Giotto (1267?-1337) en la kapelo de Scrovegni en la urbo Padovo, kiu situas proksime al Venecio. Tiuj ĉi estas unu serio da pentraĵoj, kiuj temas pri la vivo de Jesuo Kristo. Kaj ni povas vidi aliajn, ankaŭ mondfamajn murpentraĵojn de Giotto en la Baziliko de San Francisko en la urbo Asizio. Mi ofte vizitis la Bazilikon kaj vidis ilin. Temas pri la vivo de Sankta Francisko de Asizio. Mi ne estas kristano, sed la pentraĵoj estas tre belaj kaj mi ĉiam kortuŝiĝas.

Due mi memoras la murpentraĵojn de Piero della Francesca (1412-1492), kiuj troviĝas en la kirko de Sankta Francisko en la urbo Arezzo, kiu situas en la provinco Toskanio. Tiuj ĉi murpentraĵoj temas pri la Legendo de la Sankta Kruco kaj ornamas la murojn de la absido malantaŭ la altaro.

Trie oni povas vidi la pentraĵojn de Perugino (1448?-1492) en la kolegio de monŝanĝisto en la urbo Peruĝo, kie mi loĝis unu kaj duonjarojn. Temas pri diversaj temoj, kiel ekzemple, la naskiĝo kaj la ascensio de Jesuo Kristo, la alegorio de la singardemo kaj la justeco ktp. Tiu ĉi salono estas ornamita per multaj murpentraĵoj de Perugino kaj tial oni nomas ĝin “ la plej bela banko en la mondo ”. Perugino naskiĝis en la urbo Città della Pieve, proksima al Peruĝo, kaj aktive agadis en Peruĝo. Lia vera nomo estas Pietro Vannucci. Perugino estas la kromnomo kaj signifas peruĝanon. Rafaelo estis unu el liaj disĉiploj kaj poste fariĝis pli famekonata ol sia majstro. Multaj pentraĵoj de Perugino ankoraŭ ekzistas en la kirkoj en Peruĝo kaj aliaj urboj en la provinco Umbrio.

Kvare kaj laste mi prezentos al vi la murpentraĵojn de Caravaggio (1571-1610). Li faris ilin por tri kirkoj en Romo. La pentraĵoj estas produktitaj en sia matura periodo kaj multaj homoj ĉiam svarmas en la kirkoj por vidi tiujn ĉi mondfamajn majstroverkojn. Kiam mi vizitis Romon, mi ofte vizitis la kirkojn por vidi ilin. La temoj estas la vokiĝo de Sankta Mateo, la konvertiĝo de Sankta Paŭlo, Sankta Patrino de Loreto ktp.

Liaj verkoj ĉiam faras grandan impreson sur mi per la kontrasto de la lumo kaj la ombro, la drameca komponado kaj la esprimo de sentoj, la doloro, la tristeco ktp. Estas anstataŭigebla sperto per nenio, ke mi povas esti en la loko, kie la majstroverkoj de Caravaggio ekzistas.

Li ĉiam multe trinkis, ebriiĝis kaj luktis kun kanajloj. Iun tagon en 1606 li hazarde murdis unu junulon kaj estis kondamnita al morto kaj pro tio fuĝis unue al Napolo kaj poste al la insulo Malto kaj faris kelkajn pentraĵojn tie por perlabori vivkoston. Bedaŭrinde mi ankoraŭ ne vidis lian plej altan verkon, kiu temas pri la dehako de Johano, la baptisto kaj ornamas la muron de la Baziliko en Malto. Iam mi volas vidi ĝin.

★★総会報告★★

読書会 Ni legu の記録

1 概要

① 日時・会場

日程は以下のとおり。時間は午後4～6時。会場はセンター事務所。

2014年 6/12 7/24 9/4 10/2 11/6 12/4

2015年 1/29 3/12 合計8回

② 参加者

米川五郎、山田義、前田可一、伊藤俊彦 合計4名。

なお、米川は2015年3月12日から参加。他3名は初回から参加。

③ 進め方等

毎回、テキストを各自が予め30ページ程度読んできて、当日は、理解できなかった箇所、感心した表現、時代背景、著者の見解などについて自由に発言し、議論するというやり方で進めた。

なお、読書会の名称 Ni legu は山田義の命名による。

また、読書会の案内、開催状況等については、センター通信、Facebook で報告した。

2 テキスト

① HORI Jasuo “Raportoj el Japanio n-ro 15 (Katastrofo de Japanio)” (2012)

読書会では、2014年6月12日以来、堀泰雄さんの Raportoj el Japanio n-ro 15 を6回にわたって読んだ。本書は、3.11後の被災地の状況や被災者の声などを生々しく伝えるドキュメント（2011年3月から2012年3月までの状況を扱う）。エスペラントで時事的な問題をどのように表現するかという点で、本書は大いに参考になった。また、本書が提起している問題は、現在私たちが直面して

いる課題そのものなので、読書会では、ともするとテキストの文脈を離れて議論が沸騰することもたびたびであったが、それをも含めて、有益な機会を持つことができた。


② Julian Modest “Mara stelo” (2013)

12月4日をもって、“Raportoj el Japanio”は一応終了し、次は趣向を変えて、Julian Modest の最新短編小説集の Mara stelo を読んでいる。本書は、1952年生まれのブルガリアの作家の18冊目となるエスペラントによる著作で、円熟した文体や描写の冴えを味わいつつ、社会主義崩壊後のブルガリアの社会を背景とする作品世界の読みを深めるべく議論している。

3 今後の予定

今回は、4月23日（木）午後4時～6時。参加者は、Mara stelo (p62～67)、La mevoj ne forflugas en la pluvo (p68～74)、Nevidebla knabo (p75～77)、Nina kaj la knabo (p78～82) の4編に予め目を通して、疑問点や感想などを整理しておくこと。

その後もう1回で本書を読み終え、その次の回からは別のテキスト（未定）を読む予定。



「イーブルなごや・フェスティバル2015」

Ĉambro Ĉarmaが 参加

6月27日(土) 9:00～15:00のメインイベントにおでかけください。
全館オープンでグループの活動日です。

「国際語エスペラントを知ろう！」は

エスペラント語学習グループ・Ĉambro Ĉarma が10時から14時まで、スライドショーと展示をしています。展示品は群馬の堀泰雄さんから外国での写真などをお借りしました。スライドはプロジェクターで映し出そうと山田義さんが準備しています。

問い合わせ：TEL/FAX 052-801-8735 山本由紀子



(名古屋市 男女平等参画推進センター・女性会館)



第64回東海エスペラント大会のご案内

エスペラントのPR、そして新たなエスペランチストの誕生を期し、岐阜の地で開催することとしました。鵜飼見物、そして温泉に入って日頃の疲れも癒しましょう。多くの皆さんの参加をお待ちしています。（申し訳ありませんが、宿の都合で平日設定となりました。）

主催・東海エスペラント連盟

6月3日（水）

会場 （1） ハートフルスクエアG （JR岐阜駅隣 有料P有）

13：30～16：45 一般向けエスペラント講習会

講演「エスペラント、震災、平和」

堀 泰雄氏

その他

——会場をホテルパークへ移動——

* 長良川温泉「ホテルパーク」岐阜市湊町397-2 (058-265-5211)

交通：JR岐阜駅11～13番乗場～長良橋下車、徒歩1分

（2） 18：00～20：30 鵜飼船乗船（椅子無し）夕食、鵜飼観覧。

20：30～21：30 Gaja Vespero （出演者、募集中）

6月4日（木） 9：00～9：50 講演 「似て非なる友達」 小川博仁氏

10：00 閉会后 各自観光

参加費 （1） ハートフルスクエアG部のみ 500円

（1）、（2）共参加 （ホテル宿泊）16,500円

* 宿泊及び鵜飼船15人乗り貸切予約の為、15人を超えた場合、宿泊料金は変わる可能性があります、鵜飼船は一般客との乗り合いとなります。

申し込みとお問い合わせ

後藤好美

Tel 0568-61-2801 Eメール：yosimi51@mf.ccnw.ne.jp

編集者から センター通信 277 Majo 2015

○新入会員の自己紹介を載せることができうれしい。次の人、次号に書いてくださいね。
○今号から題字を変更、La Informilo de Nagoja Esperanto-Centro のフォントはCochinコシャンというフォントを使用、Nagoja の色は金色のつもり。○センターの Facebook のアドレスも題字の下に、「いいね」！○写真やプレゼン画面は誌面を飾ります。○「センター通信」は紙だけでなく電子版を希望者にはメール添付して送っている。○数週間後にはセンターのホームページにも掲載しているので、検索サイトで引っかけることがあり、存在感あり。peruigio で検索してみて！○今号は18ページ、封筒込みで定形外の50g以内、120円でギリギリで収まりそうだ。クロネコは、もっと重くても80円だったのに…。 山田 義